


sub la suda kruco ★
junio 2013

ESPERANTO



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIIOJ

Volumo 21 [2] numero 113 junio 2013

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
Redaktoroj: Kam Lee, Robert Budzul kaj David Ryan
Kontaktadreso | esk2@esperanto.org.au

P.O. Box 1097
Bendigo Central Vic 3552
Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto Sub la Suda Krucio estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEa | www.esperanto.org.nz – exec@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia oficiala kontaktadreso, "esk2@esperanto.org.au".

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15-a de septembro 2013

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj
en ĉi eldonaĵo respondecas la aŭtoroj.
Ili ne necese spegulas la opiniojn
aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2013 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj

ISSN 1038-9380

Sur la kovrilo: Supre, membroj de Esperanto-klaso de Trevor Steele dum la Aŭstralia Esperanta Bonvola Kongreso en Melburno, 2013
Malsupre: Oficialaj emblemoj de NZEA kaj AEA

Sur la malantaŭa kovrilo:

Supre: Ponto Bolte kaj Melburna komerca centro en la fono
Malsupre: Antaŭ la martunelo ĉe Fosilia Golfeto en suda Tasmanio

Renaskiĝo de post-tertrema urbo

5

Laboro de naturpolicisto

8

**Aŭstralia Esperanto-kongreso en
Melburno, januaro 2013**

12

La “Kapricemulino”

19

**Kiel enkonduki Esperanton en
lernejojn en Aŭstralio**

22

**Gratulon al elstara instruisto
de Esperanto**

26

Sudaŭstralia Vintrokursaro

27

**Tasmania ekskurso kaj serĉo
por hipioj**

28

Junio, du mil dektri

Antaŭparolo

Ekde januaro ĝis junio mi bonŝance laboris en Christchurch. En ĉi tiu numero de ESK mi raportas pri la grandskala rekonstruado en tiu urbo post la teruraj tertremoj de antaŭ du jaroj. Ankoraŭ estas multo farenda, sed oni nun vidas ekon de progreso.

Ekde la lasta numero de ESK mi denove vizitis Aŭstralion kun mia familio kaj, kiel ofte kiam ni vizitas Aŭstralion, ni pasigis tagon en natura/besta parko. Tie miaj filinoj ĝoje alproksimiĝis al kanguruoj kaj aliaj aŭstraliaj bestoj. Ni trovis kanguruon, en la ĉi-suba foto, kiu ĝuis la varmecon de la brila suno. Kian belan vivon havas kanguruoj, ĉu ne?

Tamen ne ĉiam temas pri nov-zelandanoj kiuj vizitas Aŭstralion. Mi volas menciigi ke daŭras bonaj diplomataj interrilatoj



Bildo 1: Bela vivo por kanguruo en bestparko, ĉu ne?

inter niaj asocioj en Aŭstralio kaj Nov-zelando. En januaro ĉi-jare, Ŝandor Horvath kaj Helen Palmer el Aŭstralio ekskursis kun nov-zelandanoj en la naturparko Kaimanawa en Nov-Zelando. La kunekskurso sukcesis, sed mi ne certas ĉu ili sukcesis trovi tion kion ili ŝercis laŭ la ĉi-suba foto.

En ĉi tiu numero de ESK ni aperigas specialan artikolon de vojaĝema aŭstralia best-esperantisto. Ni dankas lin pro lia kontribuo kaj ni esperas ke aliaj legantoj sendos kontribuon por venontaj numeroj de ĉi tiu nia revuo.

Ankaŭ en ĉi tiu numero aperas artikolo de Yvan Serve el Nov-Kaledonio. Mi ĝojas ke venas kontribuo el alia lando sub la suda kruco.

David Ryan

Bildo 2: Ĉu ili ĉasas beston, kun granda monpremio? Ĉu ili estas fakte ĉasistoj kaj devas eskapi el siaj postkurantoj?



Renaskiĝo de post- tertrema urbo

De David Ryan

Antaŭaj numeroj de ESK jam raportis pri la rezultoj de la teruraj tertremoj en Christchurch ekde septembro de 2010. Nun mi volas raporti pri la rekonstruado de Christchurch.

Bonŝance mi laboris en Christchurch ekde januaro ĝis junio de ĉi tiu jaro. Ĉiusemajne mi flugis tien el mia nuna hejmo en Wellington. Post kelkaj semajnoj, frua ellitiĝo por iri al la flughaveno komencis lacigi min. Tamen, mi profitis mian restadon tie por vidi multajn ŝanĝojn en la detruita urbo kaj por lerni pri kelkaj defioj.

- Kion oni devas rekonstrui? En la urbcentro pli ol mil konstruaĵoj falis pro la tertremo, aŭ poste kiam oni devis faligi ilin ĉar ili riskis fali en posta terskuo, aŭ ĉar la registaro aĉetis teron por tie konstrui novajn publikajn konstruaĵojn. Ekzemple, la urbcentra biblioteko ne grave difektiĝis en la tertremo (kvankam miloj da

libroj falis surplanken). Tamen, la registaro decidis aĉeti tiun stratangulon por tie konstrui novan kongresejon.

- Proksimume 85% de la 200 000 domoj en Christchurch iome difektiĝis. Por kelkaj falis nur kamentubo sed pli ol sep mil tute difektiĝis. La registaro aĉetis tiujn domojn de la antaŭaj posedantoj, sed kelkaj homoj ne volas vendi sian domon kaj ili ankoraŭ restas tie en sennajbaraj stratoj. Kion oni povos fari kun tiuj homoj?
- Kiu rekonstruos la urbon? Asekuraj kompanioj rekonstruos domojn, preĝejojn, kaj komercajn konstruaĵojn ktp. La registaro devos rekonstrui lernejojn, vojojn, pontojn ktp. Oni bezonos milojn da konstruistoj kaj aliaj laborantoj, sed de kie ili venos? Nun venas multaj eksterlandaj laborantoj, precipe el Filipinoj kaj Irlando (bona novaĵo por romkatolikaj

*Bildo 1: David Ryan
ekster difektita domo*



preĝejoj en Christchurch, ĉu ne?). Antaŭ kelkaj jaroj miaj junaj kuzinoj en Christchurch plendis ke ne estas tiom da junaj samaĝaj 'edzigeblaj' viroj. Nun, male, estos tro da junaj viroj kiuj plej verŝajne dum libera tempo post longa labora tago plejparte volos trinki kaj amuziĝi. Ĉu tio estos grava socia risko por la urbo?

- Kie ili loĝos? Venos miloj da laborantoj, sed ankaŭ estas miloj da familioj kiuj perdis sian domon aŭ kiuj devos lasi sian domon dum riparado por trovi provizoran loĝejon. Multaj devas loĝi ĉe parencoj aŭ en hoteloj aŭ moteloj. Nun estas malfacile trovi domon en Christchurch por aĉeti aŭ lui. Prezoj rapide plialtiĝas. Onidire, junaj konstruistoj preferas loĝi en apartamentoj kiujn antaŭe luis universitataj studentoj – nun junuloj ne plu volas studi ĉe la universitato en Christchurch ĉar ne eblas trovi loĝadon. Oni jam komencis konstrui centojn da novaj domoj, sed tio ne estas facila, tuja tasko



Bildo 2: La tertremoj detruis multajn konstruaĵojn sed aliaj ne falis. Tamen, ili estas en danĝera stato kaj tro kostas por ripari ilin. Oni nun devas malkonstrui multajn konstruaĵojn.

Bildo 3: Post du jaroj multaj domoj restas sen enloĝantoj. Oni devas ankoraŭ forpreni ilin por lasi spacon por tie konstrui novajn domojn kaj konstruaĵojn – granda rekonstrua tasko en Christchurch bezonos multajn laborantojn.



kaj krome estas risiko de inflacio je prezo de konstrumaterialoj.

- Kion oni konstruos en la ruĝa zono? Domoj difektiĝis precipe en partoj de la orienta flanko de la urbo, kiun oni nomas nun la 'ruĝa zono'. Oni nun forprenas la difektitajn domojn por lasi grandan spacon. Kion oni faros tie? Oni ankoraŭ decidas. Ĉu eblas rekonstrui domojn tie (ĉu la kvalito de la tero taŭgas?), aŭ ĉu oni lasu ĝin kiel grandan parkon? Mia propono: konstruu nov-zelandan Disneylandon tie por allogi eksterlandajn vizitantojn!
- Ĉefe la orienta parto de la urbo suferis grandan damaĝon. Miloj da enloĝantoj lasis tiun flankon de la urbo kaj, pro la perdo de enloĝantoj, la registaro decidis fermi lernejojn. Plej verŝajne butikoj kaj aliaj komercaj entreprenoj devos ankaŭ fermi la pordojn pro manko de klientoj.

Kion fari al tiu flanko de la urbo? Ĉu enloĝantoj poste revenos?

- Oni nun komencas prepari grandajn projektojn. Ekzemploj estas granda, nova kongresejo kaj stadiono. Aparte, Christchurch havos novajn lernejojn, modernan hospitalon kaj universitaton, kaj novan – aŭ eble renovigitan malnovan katedralon ktp (la anglikana eklezio ankoraŭ devas decidi kion fari pri la simbola urbcentra katedralo). Nun la regiono Canterbury, kies ĉefa urbo estas Christchurch, estas la regiono de Nov-Zelando kiu plej rapide kreskas. Oni investas tie multe da mono kaj la loĝantaro nun kreskas refoje. Tamen, kiam oni estos fininta la rekonstruadon, kio okazos? Ĉu ankoraŭ restos laboro por konstruistoj kiuj jam venis el aliaj landoj kaj regionoj de Nov-Zelando? Oni devas zorgi pri tio: ne prokrastu la rekonstruadon, sed ne kreu grandan inflacion kaj subitan malfeliĉan finon.

Bedaŭrinde la tertremoj detruis grandan parton de bela urbo kaj mortigis 185 homojn. Tamen, je la fino de la rekonstruado (ĉu post 5 jaroj? 10 jaroj?), Christchurch estos unu el la plej modernaj urboj en la tuta mondo.

Bildo 4: Imagu kion sentis la kompatinda enloĝanto de ĉi tiu domo kiam la muroj komencis ŝanceliĝi



Laboro de naturpolicisto

Intervjuita de Kam Lee

Helen Palmer estas naturpolicisto kiu nuntempe laboras por la Sudaŭstralia Registaro.

Ŝia laboro konsistas el:

1) konservado kaj protektado de la medioj en naturparkoj 2) protektado de naturparkoj kontraŭ trudbestoj kaj trudherboj kaj 3) registro de la nuna stato kaj mediaj ŝanĝoj de naturparkoj.

1) En kiuj partoj de Aŭstralio vi laboris kiel naturpolicisto?

Mi laboris en du ŝtatoj: Sudaŭstralio kaj Norda Teritorio.

Mi laboris pli multe en Sudaŭstralio, ekzemple: Kanguruo-Insulo, Eyre-Duoninsulo, ĉirkaŭ Narracoote, kaj en multaj partoj de norda Sudaŭstralio, ekzemple en la lago Eyre kaj la montaro Flinders. Fakte, morgaŭ mi laboros en Mallee, loko kiu troviĝas je 150 kilometroj for de Adelajdo.

2) Dum via prelego en la Jubilea Kongreso en Adelajdo en 2011, vi parolis pri interesa dezerta planto, *Maireana Sedifolia*, kies familiara nomo estas “bluarbedo”. Ĉu vi deziras priskribi tiun planton?

La planto havas grizan aspekton. Ĝi estas endemia en Aŭstralio kaj uzata kiel paŝteja nutraĵo. Ĝi kreskas maksimume ĝis 1,5 metroj kaj la planto estas plenkreska post 50 jaroj kaj povas vivi almenaŭ ĝis 250 jaroj.

3) La aĝo de la bluarbedo ne povas esti mezurata per kalkulo de la ringoj en la tigo, kiel arbo. Tial, kiel oni povas dedukti la kreskrapidecon kaj aĝon de la planto?

Ĉiujare, ekde proksimume 1960, oni fotas la plantojn. Per komparo de fruaj kaj nuntempaj fotoj oni povas fari konkludon pri la kreskrapideco de la planto. Antaŭ 250 jaroj ĝis 1960, malgraŭ neĉeesto de fotiloj, oni skribis registris la aspekton de la planto.

*Bildo 1:
Bluarbeda kaj nigra
kverka pejzaĝo. La
bluarbedoj eble havas
kvindek jarojn, sed ili
povas vivi maksimume
ĝis pli ol 250 jaroj.*



4) Ĉu vi povas informi pri la leĝo en Sudaŭstralio rilate al la enkonduko kaj konservo de plantoj en bienaj lokoj?

Bienistoj ne rajtas forigi ĉeestantajn plantojn. Bienistoj ne rajtas enkonduki novajn plantojn. Ŝafo povas manĝi nur tiujn kiu ĉeestas. Ŝafoj rajtas manĝi iom da la bluarbedo sed ne ĉiom.

5) Dum 1989 oni enkondukis novan leĝon en Sudaŭstralio kiu spegulas novan sintenon al la medio. Ĉu vi povas klarigi?

La nova leĝo kontrolas la maksimuman nombron da ŝafoj kiujn bienisto rajtas havi en iu loko. Antaŭa leĝo diris ke loko devas havi minimuman nombron da bestoj (ekz. ŝafoj). La minimuma limo estis tro alta kaj konsekvence okazis grandegaj polvtempestoj antaŭe kaj precipe dum la 1980-jardeko.

6) Ĉu estas sezonoj en dezertaj naturparkoj?

Laŭ la vidpunkto de sekeco kaj malsekeco, la periodoj de sekeco estas relative longaj kaj kutime povas daŭri ses jarojn aŭ pli longe. Poste okazos mallonga periodo de malsekeco, kiu povas konsisti el kelkaj tagoj da pluvo, kaj tri monatoj da inundo



*Bildo 2:
Bluarbeda kaj nigra kverka
pejzaĝo. La bluarbedoj eble
havas kvindek jarojn, sed ili
povas vivi maksimume ĝis pli
ol 250 jaroj.*



*Bildo 3:
Helen science taksas
la dezertan medion
per "GETAC"-a
(General Electric
Telemetry and
Control) (En
Esperanto Ĝenerala
Elektra Telemezuro
kaj Kontrolo)... Tiu
estas komputilo por
uzi en kamparo.
Ĝi havas speciale
evoluintan
komputilprogramon
kaj GPS (tutmonda
loktrova sistemo).*

de la tero, kio rezultas en tre abunda biologia vivo. Poste reokazos ciklo de longa periodo de sekeco kaj mallonga periodo de malsekeco kaj tiel plu.

7) Kiu estas la plej alta temperaturo en tiaj regionoj?

La maksimuma temperaturo en norda Sudaŭstralio povas atingi 45 gradojn dum la somero. Vintre, la temperaturo povas esti subnula.

8) Kiu estis la plej alta temperaturo kiun vi spertis dum via laboro kiel naturpolicisto?

La maksimuma temperaturo kiun mi spertis estis 43 gradoj.

9) Se la temperaturo troaltiĝas, ĉu naturpolicistoj rajtas ne labori ekstere?

Jes, je 40 gradoj. Tamen estas esceptoj dum specifaj situacioj. Naturpolicistoj ne rajtas ĉasi koalojn en Kanguruo-Insulo se la temperaturo estas 30 gradoj aŭ pli pro risko de serioza varmstreĉo. Koaloj ne havas bonan biologian sistemon por malaltigi sian korptemperaturon kaj ofte dormas dum la tago. Nuntempe estas programo en Kanguruo-Insulo

por ĉasi, kapti, kaj steriligi koalojn ĉar estas tro da koalaj.

10) Ĉu okazis interesaj momentoj dum via laboro?

Bienisto rekomendis ke ni tendumu ĉe lageto. Tendumonte, ni rimarkis la ĉeeston de proksimume 40 mortitaj kaproj kaj grandegan malbonan odoron. Pro tiu ŝoko ni tendumis en alia loko.

11) Ĉu nuntempe estas barieroj en Sudaŭstralio kiuj nebligas la trapason de kunikloj al agrikulturaj lokoj?

Tiaj barieroj estas en Okcidenta Aŭstralio kaj ne en Sudaŭstralio. La barieroj finkonstruiĝis en 1907, sed ekde la uzo de kontraŭkunikla miksomatozo dum la 1950-aj jaroj, la graveco de la bariero malgrandiĝis.

Tamen en Sudaŭstralio estas hundnepenetreblaj barieroj konstruitaj en 1946. Norde de la bariero kultiviĝas bovoj, kiuj ne estas minacataj de lokaj hundoj. Sude de la bariero kultiviĝas ŝafoj kies ŝafidoj estas protekteblaj per fizika neenirebla bariero.



Mi dankas vin pro via partoprenado en ĉi tiu intervjuo. Viaj respondoj prezentas kelkajn interesajn vidpunktojn pri la laboro de naturpolicisto.

Bildo 4: Helen staras malantaŭ grandega "mallee". La strange formita arbo povas havi pli ol ducent jarojn.

Respondo ekde vidpunkto de koalo

De Kippie Ryan

Do, Helen diras en sia intervjuo ke ŝi volas steriligi min. Tiu ideo tute ne plaĉas al mi! Mi prezentu min. Mia nomo estas Kippie. Mi naskiĝis en la koala ĉefurbo, Koala Lumpur, sed poste mi translokiĝis al Nov-Zelando kaj mi loĝas nun kun Victoria Ryan, kiu ricevis min kiel donacon antaŭ kelkaj jaroj. Mi havas tre plezurplenan vivon.

Kiel ĉiuj koaloj, mi dormas 18-20 horojn ĉiutage, mi dormas en varma lito kun Victoria, kaj oni konsideras min kiel membron de la familio. Oni eĉ organizas feston kaj kukon por mi kiam estas datrevena tago de mia naskiĝo – vidu en la foto. Manĝinte tiun grandan kukon el ĉokolado mi kompreneble devis dormi 20 horojn.

Mi ofte vojaĝas kun la familio kaj oni fotos min en multaj interesaj lokoj. Mi iris al koala parko de Currumbin ĉe Gold Coast. Mi iris tien por viziti miajn parencojn. Mi eĉ havas vestojn. Ĉu plaĉas al vi mia ĉapelo el Venecio?

Ne plaĉas al mi kiam oni parolas pri steriligado de koaloj. Ni havas niajn proprajn rajtojn, kaj ni faras grandan kontribuon al la ekonomio de Australio. Imagu kio okazos se turistoj ne plu povos viziti koalajn parkojn aŭ pagi \$20 por foto kun unu el miaj familianoj! Eble ni starigu koalan politikan partion por la venonta nacia baloto, ĉu ne?

Kippie en Venecio, Italio



Kippie festas 8 jarojn



Kippie en Meksikio



Raporto pri la Aŭstralia Esperanto-kongreso en Melburno en januaro 2013

De Nicole Else

Ĵaŭdon

Mia vojaĝo al Melburno ne perfekte komenciĝis. Kiam mi alvenis ĉe la centra stacidomo en Sidnejo mi vidis ŝildon ke la trajno al Melburno estas nuligita pro paneo. Tial, busoj anstataŭis la trajnon. Mi ne tre ŝatas longe vojaĝi en buso, sed kion fari? Mi ne vere volis prokrasti mian vojaĝon. Kvankam ne precize kiel mi intencis, mi ja alvenis en Melburno matene la 16an de januaro.

Mi veturis al la Internacia Domo kie okazas la kongreso. Iom post iom esperantistoj alvenis. Post la vespermanĝo okazis interkona vespero kun ludoj. Mi proponis ke ĉiu diru 3 frazojn pri si mem, 2 el kiuj havu verajn faktojn kaj unu frazo malverajn faktojn. La ĉeestantoj devas provi eltrovi kiu el la 3 frazoj estas malvera. Tiu ludo ja ebligis lerni ion pri la partoprenantoj.

Mi bone sukcesis trompi la ĉeestantojn dirante ke je la 4a kaj 30 matene mi estis ĉe McDonald's. Plej multaj pensis ke tio estas mia malvera frazo, sed mi ja efektive estis ĉe McDonald's tiom frue matene, ne ĉar mi tion deziris, sed ĉar ĉiuj pasaĝeroj de la buso ja devis eliri el la buso por paŭzo kaj la busŝoforo elektis halti ĉe iu McDonald's.

Vendredon

Post la malfermo okazis la unua prelego. Jonathan Cooper

prelegis pri moderna arto. Li bone prelegis en malenuiga maniero. Ekzemple, li ne hezitis ĵeti aĵojn sur la plankon por klarigi al ni kio estas moderna arto aŭ eble pli precize kio ne estas moderna arto.

Post la tepaŭzo ni devis labori en grupoj por pripensi kion ni volas ke AEA faru. Ŝajne ni bone 'laboris', ĉar estis multaj ideoj. Post la tagmanĝo Kajta Steele parolis pri la arĥivo de AEA. Se oni volas vere bone prizorgi ilin tio ja estus giganta laboro. Poste ni pridiskutis klimatsanĝiĝon kun Jennifer Bishop kaj, post tio, Trevor Steele parolis pri siaj libroj.

La vespera programo estis formala debato organizita de Daniel Kane. Du teamoj formiĝis kaj la temo estis ĉu ni subtenu Jonathan Moylan. La ĉeestantoj ŝajne tre ĝuis la debaton, kaj do tia programero povas supozeble okazi dum ĉiu kongreso. La teamo "por" facile venkis. Tiam estis mia vico prezenti kvizon. Mi aŭskultigis Esperanto-kantojn de 10 diversaj kantistoj kaj la ĉeestantoj devis provi rekonii la kantistojn kaj doni informojn pri ili.

Sabaton

La matena programo komenciĝis per prelego de Hazel Green pri la grava retejo edukado.net. Tiu retejo ne estas nur por instruistoj. Estas tie senpagaj kursoj pri diversaj temoj en Esperanto. Estas filmejo kun multaj filmetoj en Esperanto ktp. Poste venis prelego de Penny Vos. Ŝi nun deziras studi en la universitato de Kanbero.

La posttagmanĝa programo konsistis el mallongaj prezentoj de diversaj esperantistoj. El ĉiuj paroladoj laŭ mi elstaris tiu de Indrani Beharry-Lall. Ŝi bone montris al ni ke simpla demando kiel “De kie vi venas?” ne vere estas simpla demando kaj povas kaŭzi problemojn por personoj kiuj venas de nekonata loko. Indrani bone pensigis nin pri la fakto ke multaj personoj juĝas laŭ la fizika aspekto de persono. Parto de la prelegeto de Indrani nun aŭskultblas sur YouTube.

Post la tagmanĝo multaj boatekskursis. Vespere okazis bankedo. En la programo estis skribite ke la bankedo okazos en restoracio La Notte ĉe 140 Lygon Street. Tial, mi uzis Google maps por trovi 140 Lygon Street kaj tien mi veturis. Ne estis tre malproksime de la kongresejo. Tamen, kiam mi alvenis mi trovis tie malajzian restoracion kaj ne La Notte. Mi eniris kaj afablaj personoj diris al mi ke mi probable estas en la malĝusta antaŭurbo, ke ekzistas alia 140 Lygon Street en Carlton. Dum la bankedo ĉiu devis laŭvice stari kaj diri bonajn vortojn pri unu el la aliaj partoprenantoj. Tio estis tre bona ideo. Estis agrable aŭdi ion pri ĉiuj kaj aŭdi tre pozitivajn vortojn pri mi!

Dimanĉon

Komence Roger Springer parolis pri sia novaĵletero, poste Daniel Kane prelegis pri la reĝa simio, fama en ĉina kulturo. Post la tepaŭzo Jim Radford parolis pri la nova retejo de AEA kiu estos tre ampleksa. Post la tagmanĝo Helen Palmer bone

klarigis al ni pri sia nekutima laboro kontrolante ĉu ŝafoj manĝas tro da indiĝenaj plantoj. Poste Paul Green montris al ni fotojn de la multaj birdoj kiuj vizitas lian ĝardenon. Sekvis Alan Bishop kiu parolis pri ĵazo.

Post la tepaŭzo estis mia vico kaj mi montris plurajn filmetojn: rakonton de BookBox, raporton pri la Zamenhofa Festo en Sidnejo en 2011, fotojn de la Jubilea Kongreso en Adelajdo ka la filmon “Mia unua kiso”. Mi ĝojis vidi la ĉeestantojn ridi, kiam ili spektis “Mia unua kiso”.

Sekvis la parolado de Elin-Maria Evangelista. Ŝi estas novulino, svedino kiu nun loĝas en Melburno. Hazarde rigardante malnovajn svedajn gazetojn, ŝi trovis artikolon de 1935 pri svedino kiu ĉeestis la Universalan Kongreson en 1935. Elin-Maria ege ŝatis tiun artikolon kaj decidis verki romanon surbaze de la kongreso de 1935. Tial ŝi komencis lerni Esperanton kaj volas esplori la historion de Esperanto. Ŝi kredas ke ŝi bezonos almenaŭ 2-3 jarojn por finverki la romanon. Mi scivolemas kia estos la romano. Poste ni diskutis kun Marcel Leereveld pri la evoluado de Esperanto. Post la vespermanĝo okazis la adiaŭa vespero.

Lundon

Post la matenmanĝo preskaŭ ĉiuj forveturis. Tamen, mi restis kaj helpis finpaki la arkivojn kiuj estis sendotaj al Sidnejo. Mi tagmanĝis kun Katja kaj Trevor Steele kaj poste atendis la trajnon al Sidnejo. Feliĉe ja estis trajno kaj ne busoj.

Estis preskaŭ 50 partoprenantoj; tamen, sufiĉe multaj partoprenis nur parton de la kongreso. Matene okazis kurso por komencantoj kiun Trevor Steele gvidis. Mi ne ĉeestis kaj pro tio mi ne povas multon skribi pri ĝi, sed li ja havis lernantojn. Entute la kongreso estis sukcesa. La programo estis sufiĉe riĉa kaj la kongreso estis bone organizita. Esperantistoj ne kverelis eĉ se ili ankoraŭ ne konsentas ĉu AEA restu kompanio aŭ denove estu asocio. Mi kredas ke ĉiuj veturis hejmen kun bonaj memoroj pri la kongreso.

Impresoj pri nia Melburna Kongreso

Ŝandor Horvath

Nia “bonvola” kongreso okazis dum la lasta semajnfino (17/1 – 21/1) de januaro.

Mi sentas ke ni sukcesis krei bonvolan etoson. Dum tri tagoj ni ĝuis nian lingvon, ni aŭdis interesajn prezentaĵojn, ni debatis, ludis kaj lernis.

Ni komencis organizi la eventon nur meze de oktobro. Tial estis malpli da partoprenantoj (45) ol dum pasintjaraj januaraj eventoj. Tamen mi hejmenportos la jenajn memoraĵojn:

- La sufiĉe varian programon
- La prelegon de Jonathan pri - moderna arto. Spekti ĝin la duan fojon tute ne forprenis de la ĝojo kaj ekscito.
- La formalan debaton (“Ĉu ni subtenu Jonathan Moylan?”)

- La klason de Trevor kun 10 tre diversaj lernantoj.
- La prelegon de Jim pri nia planitanova retpaĝo.
- La ordigadon de nia arĥivo. (Post kelkaj semajnoj, ĝi estos transportita al Esperanto-Domo en Sidnejo). Grandegan dankojn al Hugh, Katja kaj Helen.
- La mallongajn prelegojn de Mary, Pat, Charles, Margaret, Jonathan kaj Indrani.
- La diskuton pri la estonteco de AEA. Kelkaj faris interesajn proponojn.
- La bankedon. Ni klopodis emfazi la atingojn kaj pozitivaĵojn de ĉiuj kaj ni sukcesis.

Kongresa grupfoto.

Malantaŭa vico (maldekstra al dekstra): **Katja Steele, Alan Bishop, S-ro Scriven, Trevor Steele, Charles Stevenson, Ŝandor Horvath, Jonathan Cooper, Jim Radford, Elin-Maria Evangelista**

Tria vico: **Jenny Bishop, HoYun Nah, EŭiSoels Nah, Paul Green, Hazel Green, Mary Mills, Marumi Smith, Luke Maselli**

Dua vico: **Roger Hill, Pamela Fenton, Penny Vos, Roger Springer, Mae Springer, Daniel Kane, Huigh Malcolm, Gerry Phelan, Heather Heldzingen, Helen Palmer, Marcel Leereveld**

Unua vico: **Kam Lee, Indrani Beharri-Lall, Margaret Chaldecott, Nicole Else, Bob Felby, Ken Rolls, Berilo Scriven, Patricia Palmer**






Bildo 1: Jonathan



Bildo 2: Nicole



Bildo 3: Katja



Bildo 4: Jenny

Memoroj pri la Bonvola Kongreso

Kam Lee

Tri memorindaj eventoj dum la kongreso estis 1) la debato pri ĉu AEA subtenu Jonathan Moylan, 2) boatekskurso laŭ la Rivero Yarra al Williamstown kaj 3) la bankedo.

Jonathan lastatempe aktivis en tre kontroversa afero. Nicole Else, Katja Steele kaj Jenny Bishop parolis por subteni la proponon kaj Trevor Steele, Marcel Leereveld, kaj Hazel Green parolis por kontraŭi la proponon.

Du debataj stiloj estis uzitaj. Unu stilo estis la formala prezento de la informo kaj parolado en serioza kaj memfida maniero. Ĉi tiu maniero estas bona por enkonduki la argumenton kaj almenaŭ dum la resuma parto de la debato, ĉu ne?



Bildo 5: Entuziasma kaj atenta aŭdantaro

Bildo 6: (Malsupren)

Enkonduko al la debato....

Ŝandor (viro kun verda T-ĉemizo) parolas pri la strukturo de la debato. Daniel Kane staras malantaŭ Ŝandor kaj li estas la organizanto de la intriga debata konkurso. Maldekstre sidas Trevor, Marcel kaj Hazel.



Kontraste alia stilo estas montri fortajn korpajn signalojn kaj drame argumenti. Verŝajne la aŭdantaro respondis per admiro kaj serioza respekto kaj certe pensis serioze pri la prezentita vidpunkto. Mi ŝatas ĉi tian viglan stilon.

Je la fino, la arbitricianto Daniel Kane decidis ke la rezulto de la debato estas egalgajno.

Oficiala kongresa ekskurso estis veturo laŭ la Rivero Yarra per pramŝipo al Williamstown, kiu situas je 8 km sudoriente de la centro de Melburno. La vetero estis tre bona kaj ni vidis komercejojn, apartamentojn, industrian zonon, kajojn kaj stokejojn de benzino de Melburno.

Interesa momento dum la duonhora ekskurso estis kiam ni iris sub la Ponto Bolte. (Bildo: malantaŭa paĝo) La Ponto Bolte entiĝas super la Rivero Yarra kaj estas longa je 490 metroj. La plej longa spano estas longa je 173 metroj kaj je 25 metroj super la nivelo de la rivero. La ponto estis konstruita inter 1996 ĝis 1999 kaj kostis \$75 milionojn. La ponto havas ses vojetojn de trafiko kaj 50 000 aŭtomobiloj uzas ĝin ĉiutage. Du turoj troviĝas apud la spanoj altaj je 90 metroj. Kvankam mi antaŭe loĝis en Melburno dum multaj jaroj, mi veturis aŭtomobile sur la ponto tien kaj reen nur unufoje.

Ĉe Williamstown, multaj el ni kafumis kaj aliaj rapide piediris laŭ la stratoj. Ĉi tiu malnova urbo estis la loko de la unua kolonio en Viktorio sed poste la kolonio estis



Bildo 7: Antaŭ la komenco de la ekskurso



Bildo 8: Ni atendas dum aliaj eniras la boaton.



Bildo 9: Jen granda metala fiŝo. La grandeco povas esti kalkulata per komparo kun la antaŭa stango.

Bildo 10: Dum la unua etapo de la ekskurso... videbla estas la suda parto de la cento de Melburno.



translokita al pli taŭga loko, kiu nun estas Melburno. Poste la grupo revenis al Melburno per pramŝipo kaj aliaj iris al la trajnstacio kaj revenis trajne.

La oficiala bankedo okazis ĉe restoracio La Notte en Carlton. Inter la manĝo de la bongusta itala manĝaĵo okazis malgrandaj paroladoj pri tiuj kiuj ĉeestis la bankedon. La resumoj povis temi pri anekdotoj, memorindaj eventoj, kontribuo al la Esperanta movado, historio de agado kiel membro de klubo, agado por AEA, gravaj atingoj, favoraj trajtoj kaj travivaĵoj, kaj tiel plu. Ĉiu resume havis templimon kaj averto okazis kiam la fino de la tempoperiodo proksimiĝis.

De tempo al tempo, mi estis oficiala temparbitricianto kaj donis signalon kiam restas nur 30 sekundoj. Neniu rompis la templimon!

Bildo 11: Bona foto ĵus post manĝo de bongusta deserto

Bildo 12: Paŭzo dum ĉefa plado

Bildo 13: Paŭzo post bongusta ĉefa plado



‘La Kapricemulino’

De Yvan Serve el Nov-Kaledonio

Dum mia juneco mi estis maristo kaj navigis tra la insularoj, de Nov-Kaledonio ĝis la fino de Polinezio. Mia ŝipo nomiĝis ‘La Capricieuse’, en Esperanto ‘La Kapricemulino’, kaj certe kapricema ĝi estis precipe kiam la maro estis maltrankvila.

Ĝi estis malgranda ŝipo, longa je ĉirkaŭ 74 metroj kaj larĝa je malpli ol 9 metroj. La ferdeko kuŝis je malpli ol 3 metroj super la marnivelo, de la pruo ĝis la pobo. Tiun genian ideon eltrovis la arkitektoj por malpliigi la fleksadojn de la ŝip-trabo. Anstataŭ suprengrimpi la ondojn, la malalta pruo trafenetris ilin kaj la ŝipo ne plu tangis. Bedaŭrinde kiam la pruo trafenetris la ondojn, la tuta ŝipo sekvis la pruan kaj la ondoj superakvis la tutan ferdekon. Tiajn ŝipojn la arkitektoj nomis duon-submarŝipoj. La nomo mem esprimas la realaĵon.

Sur la ferdeko ne staris kontinua superstrukturo por ŝirmi la mariston kiu bezonis moviĝi. Male oni povis trapasi la mezferdekon de unu flanko al la alia, kaj ankaŭ la ondoj tion faris. La kuirejoj situis tie kaj la pordoj malfermiĝis al tiu mezferdeko.

Nia manĝoĉambro ŝirmiĝis sub la pobferdeko. La kelnero devis supreniri la ŝtuparon, paŝi sur la ferdeko ĝis la kuirejo mezŝipe kaj



reen iri portante la pladon. Kvankvam li estis juna kaj lerta, paŝi sur la ferdeko estis iom aventureca ago. Kelkfoje kiam li revenis, restis en la plado nur la duono de la manĝaĵo. La alia duono forŝoviĝis al fiŝoj. Aliffoje li reaperis malseka ĝis la ventro kaj la plado enhavis marakvon ĝis la rondo.

Sube en la manĝoĉambro okazis alia ridinda afero. La dua bona ideo de la arkitektoj estis fiksi la tablon transverse de la ŝipo. Sed ili ne fiksis la seĝojn. Do kiam la ŝipo ruliĝis - kaj ĝi ofte ŝategis tion fari - la tuta vico da seĝoj glitis de tribordo al babordo kaj reen laŭ la ruliĝado. Ni kapablis manĝi nur kiam nia seĝo veturigis nin preter nia telero, sed, post unu aŭ du buŝplenoj ĝi veturigis nin for antaŭ ol, denove, reveturigi nin ĉe tablo. Ĉar ni estis tiel ĝentilaj ke ni ne manĝis el la telero de la najbaro, la manĝo daŭris iom pli longe. Ne gravas: pro la ruliĝado, ni ne povis fari ion ajn, krom la deĵora oficiro en la komandejo.

Tiel pasis multaj vojaĝoj tra la tiel nomata Pacifiko. Sed ni estis junaj, la insulaninoj belaj kaj

dancemaj kaj ni baldaŭ forgesis la malbonan maron tuj post kiam la ŝipo ankriĝis. Tiam la vivo estis bela!

Lasu min nun rakonti alian historion pri la ŝipo sed ĉi foje temas pri sensala akvo.

Origine tiaj ŝipoj devis protekti havenojn kie ili povis ofte reveni por proviziĝi per sensala akvo. Do, la akvofakoj estis relative malgrandaj. Male, por navigi tra la insularoj ni tiam bezonis kunporti grandajn kvantojn da akvo, ĉar ni ne povis enŝipigi akvon dum la ŝipo ankriĝis malproksime el marbordo. Tiel ne eblis.

Sekve kiam ni fornavigis longdistancan vojaĝon la vicŝipestro devis porciumi akvon. Ni rajtis uzi akvon nur dek minutojn matene kaj vespere. En la loĝejoj de oficiroj estis nur unu duŝo, kaj ebligi al 8 homoj sin purigi dum duoble dek minutoj postulis rigoran organizaĵon. Ni nin duŝis po du: la unua akvumis sin kaj eliris en la koridoron por sapumiĝi; dumtempe la dua eniris la duŝon por akvumiĝi. Kiam li eliris la unua tralavis sin kaj poste la dua, siavice. Tiel kvar homoj povis purigi sin dum dek minutoj.

Post kelkaj tagoj da porciumado, ĉiu ŝipano revis ke li rajtu duŝi sin tre longe, sen tempolimo. Tio okazis kelkfoje kiam pluvis sur la ŝipo. Celante tion, la gvatistoj serĉis la pluvnubojn per binokloj. Kiam ili trovis kurtenon da pluvo kiu kaŝis la horizonton la deĵora oficiro metis la kapuson al la nubo kaj informis la ŝipanaron per

laŭtparolilo en ĉiu fako 'Baldaŭ kolektiva duŝo sur la ferdeko'. Ĉiu ne deĵorante iĝis tre atentema. Tuj kiam ni aŭdis la pluvon sur la ladojn, ni rapide nudiĝis kaj grimpis sur la ferdekon por longe ĝui tiun donacon el la ĉielo. Sur la tuta ferdeko staris dekoj da nudaj viroj kiuj ĝoje sapumiĝis kaj tralavis sin. Tiu homamaso tute ne aspektis kiel milita ŝipanaro. Almenaŭ tiam ĉiu ŝipano kapablis vidi ke ĉiuj viroj estas similaj kia ajn estas la rango. Ĉu pro tiu vidatesto, ĉu pro tio ke ĉiu ĝuis senliman duŝon, la etoso estis ĉiam ĝojega dum la kolektivaj duŝoj. Eĉ nun mi ridetas kiam mi memoras tion, antaŭ ol la registaro decidis enŝipigi virinojn kaj miksi la ŝipanarojn. Feliĉe la nuntempaj ŝipoj povas produkti kaj uzi akvon senlime.

Komence, mi neniam komprenis kial iu decidis sendi tiun malgrandan kaj maljunegan ŝipon al vasta Pacifiko. Des pli ke ĝi jam estis malekipita kaj emeritiĝis en iu poŝthaveno. Eble la decidinto estis iu molkorulo kiu ne volis ĉeesti ĝian malrapidan agonion.

Ĉiel la reekipita ŝipo alvenis al la regiono, kaj mia tasko estis



prizorgi tiun maljunan refarbitan ferrubon. Mi ne rakontu kiel ofte ni riparis la motorojn, kiom da ŝiritaj ladoj ni veldis kaj kiom da tuboj boritaj de rusto ni devis ŝanĝi. Tamen, permesu min rakonti la lastan aferon kiu restas memorinda.

Ĉi-foje la truo aperis en la akvoprenejo de la motoroj antaŭ la ĉefkrano. Ni vane klopodis obturi la likon sed sukcesis nur malgrandigi ĝin. La maro daŭre invadis la motorfakon. Kiam mi raportis tion al ŝipestro, li decidis rapidi ĝis la insulo Wallis kiu feliĉe estis proksima. Bedaŭrinde, ni trafis ĝin tro frue. Elfluis el la laguno gravega tajda refluo kiu povis grundigi la ŝipon se ĝi provis eniri la pasejon. Kutime ŝipoj atendas la finon de la tajda elflue por reigi manovreblaj, sed tiam la elekto estis grundi en la laguno aŭ sinki mezmare. Feliĉe, la ŝipestro sukcesis eniri sen domaĝo. Jen estis mia vico ion fari. Kun helpo de insulanaj masonistoj ni konstruis lignan skatolon ĉirkaŭ la akvoprenejo kaj enŝutis enen almenaŭ duonkuban metron da mortero. Ĝia pezo malebligis la invadon de marakvo. Kiam ĝi sekiĝis la ŝipo kapablis navigi kelkajn monatojn pli.

Iom poste ni malkovris strangajn agojn far la ŝipanoj. Kutime antaŭ malankriĝo de la ŝipo ili enŝipigis kelkajn pakaĵojn, almenaŭ por siaj bezonoj dum la daŭro de la vojaĝo. Tiam ili elŝipigis grandajn pezajn bagaĝojn kiujn ili konfidis al siaj kunulinoj kiuj atendis sur la kajo. Stranga konduto, ĉu ne?



La ŝipo estas la propra domo de la vaganta ŝipano. Tie ili kutime konservas la tutan sian posedaĵon. Gravegas kiam ili elektas alian lokon kiel deponejon ĉar tiam ili montras ke ili ne plu fidas ŝipon.

Krome, iun tagon, kelkaj minutoj antaŭ malankriĝo, mi vizitis la fakon de la mekanistoj. Mi surprizite vidis plurajn balonojn ĉe la plafono. Je la fino de la ŝnureto kiu fermis ĉiun balonon pendis monujo. Certe la ŝipanoj ŝercis. Ili ne estis tiel stultaj por imagi ke tiamaniere ili povos rekapti siajn monujojn se la ŝipo sinkos. Sed la mesaĝo estis klara. Tion ili timis!

Do ĉiuj ŝipanoj ĝojis kiam la estraro decidis denove emeritigi kaj malekipi la ŝipon. Tiel finiĝis miaj zorgoj. Tamen la du jaroj kiujn mi pasigis sur tiu ŝipo restas la plej feliĉaj kiujn mi vivis. Ĉiu tago naskis novan aventuron aŭ novan defion aŭ novan ĝojon!

Kiel enkonduki Esperanton en lernejojn en Aŭstralio

De Gordon Coleman,
Direktoro de Edukado, Aŭstralia
Esperanto-Asocio (AEA)

Karaj amikoj

Mi dankas vin ĉar vi elektis min por esti Direktoro de AEA pri Edukado. Mi estis, tamen, la sola kandidato por ĉi tiu posteno.

Mi per mia plej bona peno provos efektivigi la edukcelojn de estantaj kaj estontaj membroj de AEA. Unu el miaj ĉefaj okupoj depost mia ekesperantistiĝo estas serĉi manierojn kiel enkonduki la lingvon en lernejojn sen elspezi la malabundajn monrimedojn de AEA.

Konsekvence, mia respondo partoprenigas estantajn membrojn, emeritojn, kaj aliajn interesitojn por kunlabori kaj disvastigi la lernadon de Esperanto en iliaj regionoj. Kelkaj homoj jam sukcesis iomete pri tio en Aŭstralio dum antaŭaj jaroj, sed plejparte en privataj lernejoj.

Bonŝance, la Nacia Instruprogramo ("National Curriculum") de Aŭstralio nun postulas ke ĉiuj bazlernejoj instruu LOTE (LOTE = lingvo krom la angla). Pro tio, multaj bazlernejoj ekinstruis eksterlandajn lingvojn, kiuj ekzemple estas la japana, ĉina, franca, germana, indonezia, hispana, greka, kaj eĉ kaŭrna (lingvo de la indiĝenoj de apud-adelajdaj ebenaĵoj). La fakto ke infano eklernas lingvon en

How to introduce Esperanto into Australian schools

By Gordon Coleman,
Director of Education, Australian
Esperanto Association (AEA)

Dear friends,

Thank you for electing me AEA's Director of Education, though no one else stood for the position.

I do my best to implement the educational purposes of AEA's present and potential members. One of my principal preoccupations since starting to learn Esperanto has been finding ways to introduce the language into schools without spending vast sums of AEA money. This would involve enlisting our existing members and others (including retirees and interested newcomers) in the spread of Esperanto in their local areas. A few successes of this kind have been achieved in Australia over the years, but mostly in non-state schools.

Fortunately, Australia's National Curriculum now requires all primary schools to teach languages other than English (LOTE). Many primary schools have already begun doing this for languages such as Japanese, Chinese, French, German, Indonesian, Spanish, Greek, and even Kaurana, the language of the indigenous people on the Adelaide Plains. However, just because a child begins learning a language in one primary school doesn't mean that that language will

bazlernejo ne garantias, tamen, ke tiu lernejo instruos tiun lingvon ankaŭ dum estontaj jaroj. Infano kiu eklernas la francan dum unu jaro eble devos elekti inter la germana kaj la japana (ekzemple) dum sekvonta(j) jaro(j). Tiu problemo aparte tuŝas lernantojn kiuj transiras al alia bazlernejo aŭ al mezlernejo.

Do, kiamaniere la ĉi-supro rilatas al la enkonduko de Esperanto kiel LOTE en baz- (kaj poste mez-) lernejoj?

Mi opinias ke Esperanto estas taŭga lingvo en bazlernejoj ĉar infanoj povas lerni ĝin pli rapide ol alian lingvon. Ili pli verŝajne sukcesos en Esperanto ol en alia lingvo kaj poste transpreni la de sukceso gajnitan memfidon pri lingvo-lernado al mezlernejoj (kaj aliloke). Kiam mi estis en Finnlando pasintjare, mi demandis al juna infanino en superbazaro, "Ĉu vi parolas angle?". Ŝi respondis ke ŝi parolas ne nur angle, sed ankaŭ finne (evidente), germane, kaj pole (ŝia patrino estas pola). La postan jaron, ŝi lernos la francan kaj la svedan, kaj la sekvontan jaron, ankaŭ aldonan lingvon. Ŝi estis lernejanino de la kvina jaro!

Do, kien mi kondukas vin? Ĉiu branĉo de AEA aŭ alia Esperanto-grupo povas demandi al sia hejmurba lernejo kiujn lingvojn ĝi instruas nun aŭ baldaŭ instruos. Per ĉi tiu informo, ankaŭ trovebla en la retpaĝaro de la lernejo, oni povas elekti unu el du agadeblecoj.

be on offer in future years, so a child beginning to learn French in one year may have to choose between German and Japanese in the following year(s). This particularly affects those transferring to another primary school or onto secondary school.

So how does this relate to the introduction of Esperanto as a LOTE in primary (and later into secondary) schools?

I believe that Esperanto is a particularly appropriate language in primary schools because children learn it more quickly than other languages. They can more easily succeed in Esperanto than in other languages and then carry the confidence gained from that success into their language learning in high schools and elsewhere. When I was in Finland last year, I asked a young girl at a supermarket if she spoke English. She replied that she spoke not only English but also Finnish (obviously), German, and Polish (her mother was Polish). The next year she would be able to pick up French and Swedish, and the following year yet another language. She was in year 5!

So, what is this leading to? Each branch of AEA or other Esperanto group could ask its local school which LOTE it teaches now or intends to introduce in the near future. With this information, which should be available on the school's webpage, two actions can be taken.

Se la lernejo jam instruas lingvon, la fondo de Esperanto-klubo kun voluntula gvidanto dum la tagmanĝoro povas esti proponata. Multaj lernejoj havas tagmanĝorajn klubojn por aktivigi la infanojn. Esperanto-klubo povas esti reklamataj per la avantaĝa ekzisto de senkostaj rimedoj (Lernu, Kurso de Esperanto, ktp) kaj la fakto ke infanoj povas komuniki Esperante kun infanoj en multaj aliaj landoj. AEA povas helpi per la kolektado kaj disdonado de ĝisdataj detaloj pri tiaj rimedoj (en la angla).

Se la lernejo ankoraŭ ne instruas lingvon, Esperanto tiam povas esti unu el la instruotaj lingvoj. Multaj landoj jam havas kursojn pri Esperanto. Antaŭ multaj jaroj eĉ Britio adoptis Esperanton kiel studtemon por sia GCE (Ĝenerala Atestilo pri Edukado), kaj la skolta movado disdonis Esperantajn insignojn. AEA preskaŭ certe pretos helpi pri la kolektado kaj disdonado de informoj pri aktualaj programoj tra la tuta mondo. La Esperanto-Asocio de Britio nun havas provprojektajn lernejojn ('pilot schools') en sia programo 'Springboard to Languages' (Saltotabulo al Lingvoj).

Miaopinie, jen ĉi-supre estas la plej facila, rapida, kaj kostefika maniero por grandskale enkonduki Esperanton en lernejojn, havebla al ni, treege malgranda homgrupo. Laborinte tiel en siaj apudaj regionoj, esperantistoj povos plilarĝigi siajn strebojn en regionojn najbarajn.

If the school already has a LOTE, then let's volunteer to start a lunchtime Esperanto club. Many schools have lunchtime clubs to keep the children busy, and Esperanto clubs could be promoted by pointing to the useful fact that there are many free resources (Lernu, Kurso de Esperanto, etc) and the fact that children can communicate in Esperanto with children in many other countries. AEA could help by collecting and providing details about this (in English).

If the school doesn't already have a LOTE, then Esperanto could become its first. Many countries already have school courses in Esperanto. Even the UK adopted it many years ago as a subject for its GCE (General Certificate of Education) and the Scouting movement issued Esperanto badges. AEA would almost certainly assist in locating and disseminating information about programmes currently available worldwide, eg details about the British Esperanto Association's pilot schools, now being made available through its Springboard to Languages programme.

To my mind using the methods outlined above offers the quickest, easiest, and most cost-effective way available to us, a small group of people, for introducing Esperanto into schools. Once Esperantists have approached schools in their immediate area they

Eble oni devos viziti 100 lernejojn antaŭ ol unu akceptos la proponon, sed ĉi tiu unua povos esti la saltotabulo al aliaj. Kompare kun naciaj lingvoj, la Esperanto-movado havas nur bedaŭrinde magrajn elspezeblajn monrimedojn. Tamen, ni povas fari signifoplenan komencon per miaj ĉi-supre proponitaj manieroj per la uzado de niaj plej fortaj rimedoj, tio estas la membroj de niaj organizaĵoj kaj aliaj subtenantoj.

Gordon Coleman, Dip.T., B.Ed

Gordon.Coleman715@schools.sa.edu.au

Bildo: Gordon kun kelkaj el siaj lernantinoj post sia prelego dum la Jubilea Kongreso en Adelajdo, 2011

could then extend their efforts into neighbouring areas. This might mean approaching 100 schools before one of them accepts the proposal, but that one could become the springboard to others. Compared with national languages, Esperanto has only pitifully meagre financial resources, but by using its strongest resources, the members of its organisations and supporters, we can get off to a significant start in the ways I have suggested above.

Gordon Coleman, Dip.T., B.Ed

Gordon.Coleman715@schools.sa.edu.au

Picture: Gordon with some of his students after his talk during the Jubilee Congress in Adelaide, 2011



Gratulon al elstara instruisto de Esperanto

De Katja Steele

Gordon Coleman estas instruisto de elementa lernejo, nuntempe laboranta en sudadelajda antaŭurbo en lernejo Sheidow Park. Li esperantistiĝis en 2005, aŭdinte pri nia lingvo el radia programo. Entuziasmigita li kontaktis Max Wearing, vizitis la tiujaran someran kursaron (Adelajdo) kaj eklernis Esperanton, lian unuan fremdan lingvon. Jam en la sama jaro li komencis pludoni ĝin al siaj lernantoj en la lernejo Hackham. Liaj Esperanto-lecionoj ne estis parto de la regula studprogramo; tamen ili okazadis preskaŭ ĉiusemajne. La samo ripetigas ĝis nun, krom la escepta 2010 kiam Gordon ŝanĝis lernejon al la nuna en Sheidow Park. Esperanto estas ankaŭ tie bone akceptita kaj de la lerneja estraro kaj de la lernantoj kaj iliaj gepatroj. Klara pruvo estis la Esperantlingva teatraĵeto kiun la instruisto kaj lernejoj prezentis dum la Jubilea

Kongreso de AEA en 2011. La publiko spektis ilin kun granda kontento. La infanoj kaj kelkaj el la ĉeestintaj gepatroj brilis pro fiero.

Estas 2013 kaj en la lernejo Sheidow Park ankaŭ la nunaj infanoj de Gordon, 11-12-13-jaraj, sidas en klasĉambro kun multaj Esperanto-afiŝoj. Ili eklernis Esperanton nur en tiu ĉi lerneja jaro kaj jam komencas uzi ĝin por korespondado. La instigo venis el Ĉinio: 24 infanoj serĉis korespondamikojn kaj trovis ilin en la klasĉambro de Gordon.

Gordon estas moderna instruisto ofte uzanta komputilajn-retajn eblecojn. Ekzemple, la korespondado venis pere de la programo "Digital Dialect". Tamen, li uzas ankaŭ multajn kursmaterialojn en papera-libra formo, miksante ilin laŭ propra bontrovo.

La lerneja Esperanto-instruado de Gordon daŭras jam la 9-an jaron. Proksimume 230 infanoj ricevis de li la mesaĝon pri la bona lingvo – kaj iliaj gepatroj, geavoj, amikoj ankaŭ. Atingo ne tre ofta en Aŭstralio. Multajn pliajn sukcesojn, Gordon!

Gordon en sia lernejo en 2013



Gordon kun kelkaj el siaj lernantinoj dum la Jubilea Kongreso en 2011



Sudaŭstralia Vintrokursaro

De Katja Steele

London tagmeze, la 10-an de junio, finiĝis la 5-a longsemajnfina Vintrokursaro de Sudaŭstralio. Ĝia organizanto estis elementlerneja instruisto Gordon Coleman (jam la 4-an fojon) kiu jam la 9-an jaron sukcese instruas nian lingvon al siaj lernantoj.

Dudeko da interesigantoj ĝuis la bonajn kondiĉojn de la lernejo Sheidow Park kaj la zorgeman

gastigadon de Gordon kaj lia edzino Ann.

Paul Desailly bone semis dum sia iama loĝado en Whyalla kaj semas ankaŭ nun sude de Adelajdo, tiel ke kelkaj homoj vojaĝis al la kursaro el sufiĉe foraj lokoj. La instruado okazis en tri niveloj kun instruistoj: Katja Steele, Brendan Linnane, kaj Trevor Steele. La posttagmeza programo estis prelego pri la Esperanto-movado en Slovakio (K Steele), pri virinaj vestoj komence de la 20-a jarcento (M Furness) kaj pri komputilaj E-programoj (G Coleman).



Maldekstre: Margaret Furness prezentas vestojn el la komenco de la 20-a jarcento

Malsupre: Kelkaj el la ĉeestantoj dum paŭzo



Tasmania ekskurso kaj serĉo por hipioj

De Kam Lee

En decembro 2012, Rainer, vizitantino el Japanio, du vizitantoj el Francujo, kaj mi ekskursis al Cygnet kaj ĉirkaŭaj lokoj. Rainer kaj siaj amikoj renkontiĝis dum ili loĝis samtempe en la Hobarta domo de Berndt Wechner. Cygnet estas malgranda urbo kiu situas je 40 kilometroj sude de Hobarto, en la Huon-regiono en la suda parto de Tasmanio.

Cygnet estas bone konata pro folkfestivalo kiu okazas ĉi-januare. Fakte, antaŭ multaj jaroj mi ĉeestis ĉi tiun festivalon kaj mi havas feliĉajn memorojn pri la folkkoncertoj, ludado de muziko ĉirkaŭ tendarfajro, ludado de vigla folkmuziko, kaj la kantado de folkkantoj.

Rainer volis scii ĉu la aŭtentika hipia kulturo daŭras en ĉi tiu loko kaj ĉu hipioj kutime promenas laŭ la stratoj de ĉi tiu kampara urbeto, kiel en partoj de Byron Golfo kaj Lismore.

Ni venis al Cygnet je la 11-a matene kaj ni iomete surpriziĝis ke la urbeto aspektas moderna, kulturaspecta, kaj sen troa komerca reklamado. Certe ni vidis normalajn homojn neformale promeni laŭ la strato, sed ni ne vidis hipiojn.

Rainer komentis ke sabaton hipioj kutime

ekdormas tre malfrue. Hodiaŭ estas dimanĉo kaj eĉ se estas hipioj en ĉi tiu urbeto ili ne ekvekiĝos kaj ellitiĝos ĝis tagmezo. Tamen, Rainer menciis ke dum la fonda epoko de la germana politika 'Verda' partio, iliaj elektitaj viraj politikistoj tre aspektis kiel hipioj kun longegaj barboj kaj hararo kaj alternativaspektaj vestoj. Nuntempe la elektitaj 'Verdaj' politikistoj aspektas pli moderaĵ.

Ni piediris laŭ la ĉefstrato de Cygnet kaj kafumis en trankvila ĉambro en kafejo kies desegnoj kaj meblaro aspektis kiel el la frua 20-a jarcento.

Ĉeestis multaj lokaj homoj kaj turistoj portantaj normalajn vestojn kaj estis iomete malfacile distingi inter la du grupoj aŭ eble ĉu fakte ĉeestis tri grupoj? Ni konkludis ke la serĉo por trovi hipiojn ne estis sukcesa afero. Tamen, pro neentuziasmo, ni ne petis normalaspektajn homojn ĉu ili fakte havas alternativan vivstilon, do nia esploro certe ne estis tutinkluziva.

Bildo 1: Ĝoja kafumado en agrabla kafejo en Cygnet



Ironie, mi opinias ke la angla vorto “hippie” ne estis publike menciita tro multfoje de nia grupo. Fakte, mi min demandis ĉu la ĉirkaŭuloj ekkomencis esplori antropologie nin!

La venonta ĉefa celloko estis vinfarejo, kiu antaŭe estis pomhorto. Ni trovis ĝin hazarde dum ni veturis laŭ la vojo. La ĉefa publika konstruaĵo konsistas el vingustuma ĉambro, artgalerio kaj kafejo. Dum Rainer kaj aliaj vingustumis, mi rigardis en la artgalerio artaĵojn kaj tre interesa estis spegulo kiu havis nekutiman formon kaj enhavis interesajn ornamaĵojn inkrustitajn en la larĝa spegula kadro. Poste mi eniris kelkajn originajn lignajn pomlaboristajn kabanetojn kiuj enhavis litbenkojn kaj ŝvelventran fornon. La planko estis nur la grundo kaj la interno de tiaj konstruaĵoj pensigis min pri antaŭa epoko de Tasmanio.

La venonta paŝo de nia ekskurso estis Fosilia Golfeto, kiu estas speciala pro la sekvantaj geologiaj trajtoj. Inkrustitaj en la rokoj estas multaj fosilioj de trilobuloj kiuj estas klaso de maraj artropodoj vivanta en la paleozoiko. Ni vidis belajn marklifojn kiuj enhavas interesajn desegnojn pro la ĉeesto de videblaj geologiaj tavoloj. Ni vidis ankaŭ malgrandan interesan

martunelon kiu estas pordo al alia golfeto nur dum malalta tajdo.

Mi jam vizitis ĉi tiun lokon kelkfoje antaŭe, sed ĉiam la marnivelo ne estis sufiĉa malalta por piediri tra la martunelo. Antaŭ la ekskurso, mi legis la tajdprogonzon kaj pro tio mi povis organizi nian viziton dum malalta tajdo. La rezulto estas ke la marnivelo estis malalta kaj ni povis eniri tra la martunelo kaj viziti specialan parton de la marbordo. Kia sukceso!

La martunela golfo estis ĉirkaŭita de grandaj krutaj klifoj kaj, pro la limigita eniro kontrolita de la tajdo, la loko havas trankvilan dezertecan aspekton similan al fora insulo en oceano.

Interese, tiu tre bela loko estas je nur tridekkvin kilometroj sude de Hobarto kaj eble pli rimarkeble estas ke ne multaj Tasmanianoj scias pri ĉi tiu speciala loko pri kiu mi eksciis nur kelkajn jarojn antaŭe per nova piedekskursa libro. Eble ĝi estas unu el la plej grandaj Tasmaniaj ekskurssekretoj, ĉu ne?

Bildo 2: Ni neserioze pozas ĉe la martunelo de Fosilia Golfeto.



Anoncoj

Serĉas korespondamik(in)on

Diane Grant, lernanto kaj eksinstruistino el 148 Essex Street, Masterton, Nov-Zelando, serĉas korespondamik(in)on.

Eventoj

Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) organizas diversajn eventojn. Bedaŭrinde ĉi tiu numero de ESK ne aperos ĝustatempe por informi pri la ĉi-jara kongreso. Tamen, vi trovos aliajn anoncojn pri KELI ĉe keli.chez.com.

La franca Esperanto-Kulturdomo en kastelo Greziljono invitas vin al interesaj semajnoj en la venonta norda aŭtuno, ĉiam kun kursoj kaj agadoj:

- 26 oktobro – 2 novembro:
AŬTUNE, la ferioj: Komuna feriado por infanoj, familioj, geavoj (vidu en gresillon.org/autune).

- 28 decembro – 2 januaro 2014:
Jarfina FESTego kaj Novjara FESTeno laŭ franca maniero kun maskobalo

Por ĵara kalendaro vidu gresillon.org/agendo. Ne hezitu kontakti telefone al +33-2.41.89.10.34 aŭ sendu retmesaĝon al kastelo@gresillon.org aŭ skribu al MCE Gresillon, St.Martin d'Arce, 49150 Bauge en Anjou, Francio.

Kongreso en Nov-Zelando

La venontjara kongreso en Nov-Zelando okazos en Auckland ekde la 15-a ĝis la 21-a de januaro. Pliaj detaloj aperos en la retpaĝo de NZEA en oktobro. Sperta

esperantisto venos el Nepalo por instrui kaj gvidi sesiojn.



KONGRESO DE
NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIO
15-21 JANUARO 2014

Konservacioj, prelegoj, kaj paroladoj en Esperanto

- Distraĵoj kaj muziko en Esperanto
- Instruado je ĉiuj niveloj gvidota de sperta
- Esperantisto el Nepalo
- Ekskursoj

Elstara ŝanco por akiri intensan sperton en la Internacia lingvo, ideala por ĉiuj aĝgrupoj

St Francis Retreat Centre
50 Hillsborough Rd
Hillsborough
Auckland



SOMERA LERNEJO KAJ
KONGRESO DE
ESPERANTO
KANBERO
3-12 DE JANUARO 2014

En loko proksima la Lago Burley-Griffin,
Black Mountain, kaj Civic



New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

Chris Krägeloh | President
chris.krageloh@gmail.com

Bradley McDonald | Vice-President
bradley.m@woosh.co.nz

David Ryan | Treasurer
ryangomez@xtra.co.nz

Howard Gravatt | Secretary
hgravatt@ihug.co.nz

Erin McGifford | Committee Member
erinmcgifford@hotmail.com

Rouan Van Ryn | Committee Member
a.tkanek@gmail.com

Ivan Pivac | Committee Member
ivan@zabonne.co.nz

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, answering queries from the



Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | President
prezidanto@esperanto.org.au

Kam Lee | Administrative Director
admin@esperanto.org.au

Indrani Beharry-Lall | Financial Director
financoj@esperanto.org.au

Heather Heldzingen | Director of
Member Services
servoj@esperanto.org.au

Margaret Chaldecott | Director of
Promotion
informado@esperanto.org.au

Gordon Coleman | Director of Education
edukado@esperanto.org.au

Max Wearing | Director of
Implementation
utiligado@esperanto.org.au

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.

